

La 14an de oktobro 2014

Okazis la 101a Japana Esperanto-Kongreso en la urbo Obama de la gubernio Fukui de la 11a ĝis la 13a de oktobro. Dum ĝi oni publikigis la rezulton de la Literatura Konkurso. Ĉi-jare mi sendis la ĉi-suban eseon temantan pri tri virinoj en la katastrofo, kaj mi gajnis la duan premion (sen la unua premiito).

Post la Katastrofo en 2011 mi dediĉas min al la subteno al la suferantoj, kaj vidis, kiel fortaj estas virinoj. Tiuj tri virinoj aperas en la suba foto. Kiuj estas ili ? Vi divenu.



Vivo de Tri Virinoj en la Japana Katastrofo

Kiam okazas grandaj malfaciloj, aperas vera, homa karaktero, kiu estas kaŝita en ĉiutaga banala vivo. En la tago de la grandaj tertremo kaj cunamo la 11an de marto 2011, ja viroj elstaris, ĉar en tia okazo korpa forto estas grava, sed en postaj malfaciloj kiel elstara estas forto de virinoj ! Multaj

viroj rompiĝis en provizora domo, suferante pro melankolio kaj alkoholismo, sed virinoj ĉiel trabatas sian vojon, protektante siajn familianojn.

(1)

Kiam okazis tiu grandega tertremo, s-ino Takahaŝi Ĉieko 63-jara estis en la templo Nikkoo-Tooŝooguu. Troviĝis multaj turistoj, kaj je la grandegaj tremoj ĉiuj haltigis sian paŝon kvazaŭ glaciigitaj. Malnovaj templaj konstruaĵoj tremis dekstren kaj maldekstren, kaj altaj pinarboj kaj cedroj skuiĝis kvazaŭ balai la ĉielon. Ĉiuj estis palaj kaj esprimis grandegan timon. « Certe ie okazis grandega tertremo! », « Ĉu en Niigata? » « Eble marborde de Mijagi », « Mi neniam spertis tiel grandan tertremon antaŭe ». Tiam iu junulino kriis: « Okazas grandega cunamo en la urbo Kamaiŝi, 12 metra cunamo ! La urbo Sendai estas detruita ! ». Homoj ĉirkaŭ ŝi tuj alproksimiĝis al ŝi kaj enrigardis la etan ekranon de poŝtelefono en ŝia mano. Vere grandega cunamo jam komencis penetri la ebenaĵon de Toohoku. « Aĥ, aŭtomobiloj ankoraŭ kuras, ne sciante alvenon de la cunamo! », kriis aliaj.

S-ino Takahaŝi loĝis en la urbo Morioka, la ĉefurbo de la gubernio Iŭate. Ŝia korpo tremis pro timego. La cunamo atakas ŝian gubernion ! Kio okazas al ŝiaj familianoj kaj al ŝiaj konatoj? Ŝi volis reveni hejmen plej rapide.

Ŝi estis grupe vojaĝanta el Iŭate. La grupanoj decidis tuj reveni, nuligante aliajn vizitojn. Tamen survoje ili devis havis suferojn : la vojoj estis ŝtopitaj per aŭtomobiloj kaj en la gubernio Fukuŝima, la ŝoseo difektiĝis, tamen finfine ili atingis la urbon Morioka je la 10a matene la 12an de marto 2011.

Hejme s-ino Takahaŝi spektadis televidon. La cunamaj damaĝoj estis senprecedence grandegaj. Ŝiaj konataj urboj kaj vilaĝoj malaperis. Kio okazis al ŝiaj parencoj kaj amikoj ? Pro grandega maltrankvilo ŝi ne povis endormiĝi. Ŝi devas helpi ilin, ŝi devas helpi ilin! Sed kiamaniere ? La 12a de marto pasis, kaj la 13a pasis. Ŝi aŭdis, ke en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima okazis eksplodoj. Ŝi timis, ke Japanio malaperos. Japanoj fariĝos sennaciaj migrantoj en la mondo! « Mi ne malvenku ! Mi ne malvenku ! », ŝi diradis al si, kaj serĉis helpomaterialojn en sia hejmo. Baldaŭ ŝi komencis viziti la urbon Oocuĉi, kunportante tiujn aĵojn kaj benzinon al

siaj parencoj.

Kiel mizeriĝis la urbo! Tiu urbo etendiĝis inter la buŝoj de du riveroj Oocuĉi kaj Kojari. Antaŭe estis plenplena de domoj, sed nun ĉio malaperis pro la cunamo kaj pro la posta fajrego. Homoj devis fuĝi al la najbaraj montetoj, kaj poste pli alten por eskapi la fajron. La 2-etaĝa urbodomo estis englutita de la ondegoj kaj multaj urbaj funkciuloj mortis. La plej granda templo en la urbo estis forbruligitaj kaj multaj tomboŝtonoj estis falintaj. Ŝi vidis defendkorpusanojn senvoĉe serĉi mortintojn inter rubaĵegoj.

Pasis marto. Dume helpomaterialoj atingis la damaĝitajn urbojn, do ŝi ne plu bezonis viziti siajn parencojn, sed ĉu ŝi rajtas sidi hejme, farante nenion plu? Tute ne, ŝi estas loĝanto en la damaĝita gubernio Iŭate. « Mi ne rajtas nur spekti televidon, kompatante suferantojn », « Tiu ĉi estas la historia katastrofo. Kiel homo, sincera homo, mi devas agi laŭ mia konscienco! Kion mi faru? »

Tiam aperis en ŝia kapo bildo de la maro en la vilaĝo Tooni de la urbo Kamaiŝi. Kiam ŝi estis instruistino de supera mezlernejo antaŭ 30 jaroj, ŝi kaj ŝia kolego vizitis s-ron Uĉikaŭa en tiu vilaĝo por naĝi en la maro. Tre bela golfo kaj bela plaĝo ! Kiel fartas la familio? Ĉu ili vivas? Ŝi seriĉis en la telefonlibro lian numeron kaj telefonis kun granda timo, sed feliĉe respondis gaja voĉo de lia edzino. Ĉiuj familianoj fartis bonaj, sed ŝi fariĝis malĝoja, sciante, ke multaj domoj starantaj proksime al la maro malaperis kaj kelkaj vilaĝanoj mortis.

« Mi devas helpi miajn konatojn, kiuj suferas, sed ĉu tio estas sufiĉa? Ne nur plenkreskuloj, sed ankaŭ multaj infanoj suferas. Geknaboj kaj infanoj estas nia espero plej protektenda ! Mi helpu infanojn de la vilaĝo Tooni ! Mi kolektu monon kaj ĉiun monaton donacos po 10000 enojn al ĉiuj 100 lernantojn en la vilaĝo! » Ŝi decidis tion kaj tuj komencis skribi petleterojn kaj sendis al siaj konatoj. La eĥo estis granda. Venadis mondonacoj al ŝi.

Ŝi petis ankaŭ de ĵurnalistoj aperigi artikolon pri tiu projekto. La unua artikolo aperis la 29an de junio 2011 en la ĵurnalo Mainiĉi, kaj de tiam aliĝis tre bonkoraj kaj talentaj homoj el la tuta Japanio al ŝia projekto. Tiamaniere startis la projekto « Fonduso de Espero Tooni ». En marto 2012 la fonduso povis doni grandan monsumon al la elementa kaj mezlernejoj Tooni.

Ŝi planis, ke la projekto estos unu jara, sed eĉ post unu jaro, neniu

problemo solviĝis kaj multaj homoj plu suferis. Do la fonduso daŭrigis la helpon ankaŭ en la dua jaro, kaj ĝi sukcesis donaci monon, kvankam la sumo estis pli malgranda ol en la antaŭa jaro. Eĉ post du jaroj, la problemoj ne multe solviĝis Ŝi fariĝis nervoza dum monatoj, demandante sin, ĝis kiam ŝi daŭrigu la helpon, sed poste la solvo venis. Nun ŝi estas trankvila kun certa celo, kaj ŝi firme decidis, ke ŝi vivos celante veron ĝis la fino kiel simpla, sed sincera homo.

(2)

Kiam okazis la tertremego, s-ino Taniĝaŭa Joŝie, 52-jara, estis hejme, ripozante en sia ĉambro en la distrikto Katagiŝi de la urbo Kamaŝi en la gubernio Iŭate. Ŝia edzo estis fiŝisto. Li vartis kaj rikoltis jakobajn pektenojn, ostrojn kaj undariojn en la golfo, kaj ŝi aranĝis ilin en la haveneto por surmerkatigi ilin. En marto oni komencas rikolti undariojn. Tiun tagon la geedzoj frumatene eklaboris en la golfo, do por tagmanĝo ili revenis hejmen.

Kiam ili estis en la familia ĉambro, subite okazis granda tremo. Ili neniam spertis tiel grandan tertremon. Ili ne povis fuĝi tuj, ĉar ili ne povis eĉ stari. Post kelkaj minutoj la tremo haltis kaj ili eksteren kuris. Al la kapo de s-ino Tanigaŭa aperis rakonto de sia avino pri cunamo en 1933. Tiu spertis tiun cunamon kaj apenaŭ saviĝis. Ŝi ofte diris : « Post granda tertremo senescepte venos cunamo. Vi tuj forkuru ! Ne zorgu pri aliaj homoj. Oni devas aparte fuĝu, kiam venos cunamo ! »

Jam en 1896 kaj en 1933 la vilaĝon atakis grandegaj cunamoj. En la vilaĝa templo Seigan-ĵi estas du monumentoj pri tiuj cunamoj. La bonzo antaŭe legis por la vilaĝanoj artikolon pri la cunamo en 1896, aperintan en tiutempa gazeto:

« Vespere je la 8a kaj 10 minutoj la 15an de junio apenaŭ aŭdiĝis grandega sono, venis grandega ondo. Kvazaŭ vulkano erupcius, vaporfumo tiel densege pleniĝis, ke oni ne povis vidi eĉ siajn fingrojn. La ondoj estis tiel fortaj, ke ili rompis grandajn arbojn kaj frakasis vicojn da domoj tiel facile, kvazaŭ oni faligus ŝakpecojn. Post kiam la ondoj retiriĝis, neniuj restis krom rubaĵoj. En la distriko Hongoo de Tooni ĉiuj 154 domoj estis frakasitaj kaj ĉiuj 810 vilaĝanoj krom 12 morte eniris en la stomakon de fiŝoj. Eĉ tiuj pluivintaj 12 vundiĝis severe kaj restis neniuj sen vundoj. Tooni estis unu el la plej damaĝitaj vilaĝoj. 2500 el 2800 loĝantoj mortis.

Tio estis tragedio el la tragedioj ».

S-ino Tanigaŭai preparis sin por fuĝi, sed ŝia edzo revenis al la ĉambro en la dua etaĝo kaj rigardis la maron. Antaŭ ne longe li aĉetis novan ŝipeton por rikolti undariojn en la golfo, do li volis scii, kio okazos al tiu ŝipeto.

Ŝia domo staris tuj apud la kontraŭcunama digo 10 metrojn alta en la distrikto Katagiŝi de Tooni. En tiu distrikto troviĝis 70 domoj kaj la elementa lernejo Tooni. Havante tiun grandan digon, multaj homoj kredis, ke ili estas sekuraj. Tamen ŝi ne kredis tion, ŝi kredis nur la rakonton de sia avino. Ŝi sciis, ke ofte la forto de naturo superas imagon de homoj. Ŝi hastigis la edzon, sed li ankoraŭ ne volis fuĝi. Baldaŭ ili rimarkis, ke la maro retiriĝis foren kaj aperis la marfundo. Vidante tion, finfine ŝia edzo decidis fuĝi. Li kuris per sia aŭtomobilo unua kaj ŝi volis sekvi lin per la sia, sed tro hasta ŝi estis, do estis malfacile ŝalti la motoron, sed fine ŝi sukcesis kaj kuris al la nacia vojo n-ro 45. Dume ŝi vidis maljunulojn starantajn apud sia domo. Ŝi kriis al ili : « Forkuru ! La cunamo venos ! », sed ili rifuzis forkuri, dirante : « Ni estas sufiĉe maljunaj. Lasu nin kaj vi fuĝu rapide ! » Poste ili estis trovitaj mortaj.

La vojo estis ŝtopita per aŭtomobiloj. Ŝi vidis proksimiĝantan ondegon, do forlasinte la aŭtomobilon, ŝi kuris kaj kuris. La cunamo estis tre rapida kaj kaptis ŝiajn piedojn, sed bonŝance ŝi sukcesis eskapi la ondon. Sur la nacia vojo vilaĝanoj rigardadis siajn domojn englutitaj de la ondegoj senvoĉe kun larmoj. La malgranda ebenaĵo de Kataĝiŝi estis tute kovrita de kirliĝantaj ondoj. Nur elstaris el la marakvo du betonaj konstruaĵoj de la elementa lernejo. Ĉe la randoj de la ondoj vidiĝis kelkaj homoj frosantaj. Vilaĝanoj savis kelkajn. Ili timis alvenon de pli grandaj cunamoj, kaj kuris pli alten.

En la elementa lernejo Tooni lernis 80 lernantoj. Ili grupe suprenkuris al la najbara ŝintoisma templo Amaterasu-mioja-ĵinĵa, 50 metrojn alta. La ondo atingis la 60an ŝtupon, preskaŭ 30 metrojn altan. Iuj lernantoj, vidante la proksimiĝantan cunamon, kriis al la cunamo kun larmoj : « Aĥ, mia domo ne perdiĝu ! » « Fi, kia cunamo ! » « Mia malsana avino kuŝas en la domo ! Ŝi mortos ! », « Fi, cunamon for ! ». Kiom da kordoloro ili sentis, rigardante siajn domojn malaperantaj en la ondojn ? Ili pasigis du tagojn maltrankvile en la salonoj de la templo. Ĉiuj lernantoj estis savitaj. Neniu mortis. Tio estis tre ĝojiga afero.

Filo de s-ino Tanigaŭa estis mezlernejano de la 2a lernojaro. La

mezlernejo Tooni estas en alia distrikto Koŝirahama. Ĝi estas en alta loko, do ne atakis ĝin la cunamo, sed la tertremo difektis la konstruaĵon. Kiam okazis la tertremo, multaj lernantoj ankoraŭ restis en la lernejo, sed ŝia filo jam estis survoje al la hejmo, tamen sentante, ke io neordinara okazas, li revenis al la lernejo.

Ŝiaj familianoj estis savitaj, sed ili perdis domon kaj ĉiujn aĵojn en ĝi, du ŝipetojn, du aŭtomobilojn kaj laborejan dometon en la haveneto. Sur la tereno de ŝia domo restis nur bankuvo inter la detruitaj muroj. Tiun ĉi domon kun impona tegmento ŝia edzo konstruigis per mono, kiun li ŝparis dum 14 jaroj da severa laboro de tinusa kaptado en fora maro. Sed ĉio estis perdita.

Kaj ankaŭ sano de ŝia filo perdiĝis. Post la katastrofo ŝia filo havis koŝmaron ĉiun nokton. Li vidis la cunamon transiri la digon, ataki la vilaĝon kaj detruai domojn. Krome en tiu cunamo mortis lia samklasanino, kiu restis hejme pro malsano. Tiuj ŝokaj kaj malĝojigaj aferoj donis al li grandan ŝokon. Ĉiun nokton aperis teruraj bildoj en lia sonĝo, kaj timante tion, li ne povis endormiĝi ĝis la 3a aŭ 4a matene.

La filo finis la kurson de la mezlernejo en marto 2012 kaj decidis eniri en superan mezlernejon en Morioka. Okaze de tio, liaj gepatroj aĉetis malnovan domon en la urbo kaj translokiĝis, opiniante, ke loĝi for de la maro estos bone por sano de ilia filo. Komenco ĉio estis ŝajne bonorda, sed fariĝis pli kaj pli malfacile por li adaptiĝi al la lerneja vivo en la urbo. Li ĉiam diras al la gepatroj: « Mi certe resaniĝos, mi certe resaniĝos! », sed eĉ nun li ankoraŭ restadas hejme.

Ŝia edzo ĉesis labori kiel fiŝisto kaj trovis novan laboron en Morioka, sed lia salajro ne estas sufiĉe alta. Li intencas denove labori por tinusa kaptado. Sed en tiu okazo, li forestos longe, ne povante prizorgi siajn edzinon kaj filon hejme. Ĉu tio estos bona por la familio? S-ino Tanigaŭa eklaboris en maljunulejo, sed ankaŭ ŝi ne adaptiĝis al la laborejo. Kion ŝi faras nun?

Pro la cunamo, ili ne nur perdis ĉion, sed ankaŭ suferas pro novaj malfaciloj. Tamen ŝi ne perdis esperon. Ŝi batalas kontraŭ ĉiuj malfaciloj por ke ŝia filo resaniĝu kaj plenumu sian revon fariĝi sciencisto. Antaŭ ol ŝi translokiĝis al Morioka, ŝi laboris por la Fonduso de Espero Tooni. La membroj sendis al ŝi helpomaterialojn, kiujn ŝi disdonis al rifuĝintoj. Ni multe dankas al ŝi kaj esperas, ke ŝi reakiros feliĉan vivon kun siaj edzo kaj

filo.

(3)

S-ino Fujii Fumiko, 75-jara, loĝas en Gunma, do la katastrofo ne damaĝis ŝian vivon. Ŝi komencis partopreni en la “Fonduso de Espero Tooni” jam en 2011.

Ŝi naskiĝis al malriĉa familio en la kamparo de Gunma, tamen ŝi povis eniri en universitaton, ricevante stipendion. Tiu universitato estis fondita de iu kristana sekto, kaj ŝi ricevis sufiĉe grandan sumon da mono ĉiun monaton sen devo repagi poste. Iun tagon ŝi demande diris al la respondeculino, usona misiistino, « Mi tre dankas vin pro la stipendio, sed la sumo ests tre granda. Ĉu mi rajtas ricevi tiom multe? » La misiistino respondis: « Jes, vi rajtas. Tiu stipendio venis de multaj bonkoraj homoj en la mondo. Ili volas, ke vi studu bone dank’ al tiu stipendio. Do unue, vi studu bone. Tio signifas repagi vian ŝuldon al tiuj bonkoruloj. Kaj la plej grave estas helpi aliajn, kiam vi povos fari tion, samkiel viaj helpantoj helpas vin nun ».

Ŝi finis studadon en la universitato, kaj poste komencis labori en iu kompanio. Pli poste ŝi amis junulon kaj edziniĝis al li. Li estis kuracisto. Li malfermis malgrandan klinikon en vilaĝo kaj kuracadis sincere la vilaĝanojn dum 40 jaroj. Helpante lin, ŝi laboris en la kliniko. Kiam okazis la tertremo, ŝia edzo estis en hospitalo, suferante pro kancero. Spektante televidon pri la damaĝoj kaj suferoj de la loĝantoj laŭ la marbordo de Toohoku, ĉiun tagon li diris: “Se mi estus sana, mi tuj irus por helpi suferantojn. Mi tre bedaŭras, ke mi estas malsana”. Du monatojn poste, en majo 2011, li mortis.

En malĝojo ŝi sola vivis, kiam ŝi legis artikolon en la ĵurnalo Mainiĉi la 29an de junio 2011, kiu raportis pri helpagado de s-ino Takahaŝi. Ŝi tuj aliĝis al ŝi. Ŝi opiniis, ke fine venis tempo, kiam ŝi povos repagi « la stipendian monon ». Ekde tiu monato ŝi sendadas monon al la geknaboj de Tooni pere de la fonduso.

Ĉiun jaron dufoje membroj de la fonduso vizitas la lernejojn Tooni okaze de du jenaj eventoj: Koncerto « Sankta Lucio » de Carol, usona misiistino-harpisto (en decembro), kaj la kursfina ceremonio de la mezlernejo Tooni (en marto). La unua estas organizita de la fonduso kaj la dua, kompreneble, de la lernejo. En la koncerto Carol ludas konsolan

melodion per harpo, kaj dume la membro kovras la ŝultrojn de la lernantoj per ŝalo. Estas grandega ĝojo, ke la membroj havas okazon renkonti kaj kuraĝigi ilin. S-ino Fujii varme alparolas al ili kaj mildigas ilian koron. Ŝi sentas, ke la lernantoj estas kvazaŭ siaj nepoj. En lernejoj ili ŝajne estas gajaj, sed certe ili havas diversajn suferojn pro perdo de siaj domoj kaj posedaĵoj kaj pro vivmalfacilo de siaj gepatroj. Por estis ĉiam apud ili, ŝi volas vivi, viziti la lernejojn kaj subteni ilin ĝis 2020, kiam la fonduso finos helpi ilin.

La jaro 2020 estos la jaro de Tokiaj Olimpikoj, sed ankaŭ la jaro, kiam la gelernantoj, kiuj eniris en elementan lernejon en 2011, finos la kurson de mezlernejo. Al s-ino Takahaŝi ŝi menciis tion. S-ino Takahaŝi respondis al ŝi, skribante : « Dank' al via mencio, mi estas liberigita de la obsedo pri tio, ĝis kiam la fonduso helpu ilin. Ni daŭrigu helpon ĝis 2020, kaj post la kursfina ceremonio de la mezlernejo Tooni en marto 2020 ni deklaras la finon de nia fonduso ».

Tamen estos malfacile daŭrigi la agadon tiel longe, do la fonduso faris belan broŝuron por plifortigi la movadon, kaj nun havas foto-ekspozicion pri Tooni en Tokio, Takasaki, Kioto kaj Kanazaŭa kaj Sapporo.

S-ino Fujii longe deziris redoni sian ŝuldon al aliaj. Post 40 jaroj fine ŝi sukcesis en tio, kaj ŝi nun deziras, ke tiuj lernantoj, kiuj ricevas helpon de la fonduso, poste redonu sian ŝuldon al aliaj, kaj tiuj plu redonu al aliaj ..., kaj tiamanire la cirklo de bonkoreco ciklu en nia socio kaj en la mondo.

La katastrofo donas grandan suferon al la suferantoj. Ĉu ni ne povos krei novan, esperplenan mondon el la katastrofo? Se ni ne povos sukcesi en tio, la katastrofo restas eterne katastrofo kaj nenion bonan donos al la suferantoj kaj la mondo. Ni faru grandan cirklon de bono samkiel s-ino Fujii faras. Ni cikligu bonon, bonkorecon, sincerecon kaj ĉion bonan en la mondo. Ni sekvu la ĉi-suprajn tri virinojn kiel bonajn modelojn.

HORI JASUO